



**FLANDRA  
ESPERANTISTO**  
MONATA REVUO  
ORGANO DE LA FLANDRA  
ESPERANTO  
MOVADO

ENHAVO:

1. HENDRIK CONSCIENCE.— 2. NIGRA PAĜO EN MIA KONGRESLIBRO.— 3. KOMUNIKOJ DE LA ESTRARO.— 4. BRUĜO LA BELA.— 5. SURPRIZO—SKIZO— 6. EŬROPO HODIAŬ — 7. EL ĈEĤOSLOVAKUJO. — 8. MORTO DE PANJO — 9. ĈI-TIE LA FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA. — 10. DIVERSAĴOJ. 11 POR NIA LIGA FLAGO.— 12. INTER NI.— 13 BIBLIOGRAFIO.— 14. ANGULO DE LA SERĈEMULOJ.

Orgaan van den  
VLAAMSCHEN. ESPERANTISTENBOND



---

---

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA.  
(Vlaamsche Esperantisten - Bond)

---

---

HOOFDBESTUUR :

*Voorzitter* : H. Rainson, Steenweg op Hombeek 54, Mechelen.  
*Ondervoorzitter* : E. Cortvriendt, P. van Humbeckstr. 3, Brussel-W.  
*Sekretaris* : G. Debrouwere, Magdalenastr. 29, Kortrijk Tel. 1654.  
*Penningmeester* : A. De Keijzer, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.

DIENSTEN :

*Tentoonstellingsmateriaal* : G. De Boes, Wijnstraat 81, Ronse.  
*Grupkonsilanto* : A. De Troeyer, Vrijheid 98, Arendonk.  
*Kursussen* : H. Rainson, Stw. Hombeek 54, Mechelen.

AFDEELINGEN TE :

SEKCIOJ EN :

Aalst, Aarschot, Alveringem, Antwerpen, Anzegem, Arendonk, Avelgem, Beersse, Berlaar, Bertem, Blankenberge, Bornem, Breedene, Brugge, Brussel, Deinze, Denderleeuw, Diest, Diksmuide, Erembodegem, Gavere, Gent, Harelbeke, Heist op-den-Berg, Heist op-den Berg (Goor), Herenthout, Kasterlee, Koekelare, Kontich, Kortemark, Kortrijk, Kuurne, Langemark, Lebbeke, Leuven, Lichtervelde, Mechelen, Meenen, Merchtem, Meulebeke, Middelerke, Mol, Nederbrakel, Ninove, Oostende, Oostmalle, Oudenaarde, Oud-Turnhout, Poperingen, Putte, Puurs, Ravels, Roeselare, Staden, St. Amands, Tervueren, Tielt (West VI), Tienen, Torhout, Turnhout, Veurne, Vichte, Vilvoorde, Vlamertinge, Waregem, Wervik, Wetteren, Wevelgem, Willebroek, Wilsede, Wingene, Woumen, Zottegem, Zwevegem.

VERTEGENWOORDIGERS TE :

REPREZENTANTOJ EN :

Assche (Brab.), Deerlijk, Hamme (Oost VI.), Mortsel, Munkzwalm, Ronse, St. Truiden, Tielt.

ORGAAN :

« Flandra Esperantisto » verschijnt maandelijks.  
*Redaktie* : Ten Eeckhovelei 125, Deurne-Noord (Antwerpen).  
*Kopij* : uiterlijk 15-en ieder maand bij de redaktie.  
*Administratie* : Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.  
*Advertenties* : barema op aanvraag.

LIDMAATSCHAP :

Leden-abonntenen : fr. 25 's jaars.  
Eenvoudige leden : fr. 5 's jaars.

POSTREKENING :

2321.50 van Flandr. Ligo Esperantista, Brussel.

---

---

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas :

**Flandra Ligo Esperantista!**

---

---

# FLANDRA ESPERANTISTO

ORGANO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO: Ten Eeckhovelei 125

ADMINISTRACIO: Vlaamsche Stw., 70

Deurne - Noord

Antwerpen.

Brussel

P. K. : 2321.50 de Fl. L. E.


Jara kotizo-abono Fr. 25

APERAS MONATE

## HENDRIK CONSCIENCE

HEROLDO DE LA FLANDRA REKONSCIIGO.

*Okaze de la centjara datreveno de la apero de lia ĉefverko « La Leono de Flandrujo »*





Hendrik Conscience ekverkis en periodo dum kiu Flandrujo kulture kaj ekonomie letargiis. Flandrujo, lando iam staranta ĉe la pinto de la kulturo, iam mondfama pro sia arto, iam enviata pro sia ekonomia prospero, iam potenca per siaj gildoj kaj populregado, Flandrujo inertiĝis. El la sinteno de la ĵus naskita ŝtato (Belgujo estiĝis en 1830) rilate la flandran (nederlandan) lingvon — la lingvo de l' plimulto — rezultis, ke la flandra popolo, ĵus travivinta neniigajn batojn, morale kaj materie iĝis paria. La flandra nacia sento tute perdiĝis, kaj la rebato sur la kampo materia estis katastrofa. Ĉiujn gvidajn postenojn okupis alilingvanoj. Estis periodo dum kiu la flandra popolo iĝis « popolo de servistoj kaj servistinoj » rezignacie suferanta plej humiligan traktadon... H. Conscience estis la ĉefa heroldo kiu vekis sian popolon el tiu mortiga letargio, tial la flandroj ŝuldas al li senliman dankon.

La nacia rekonsciigo en Flandrujo intime ligiĝas al la flandra lingvo. H. Conscience, kiu devis forlasi la gepatran domon, ĉar li kuraĝis verki en « la lingvo de l' popolaĉo », precipe per siaj historiaj verkoj montris al la flandroj propran estintecon kaj sekve vekis en ili fortan sopiron al rajto kaj libero. Tion li faris per lingvo simpla, simplega eĉ, sed ho, kiom kortuŝa! Tiutempe la analfabeta flandra popolo tian simplan lingvon bezonis. Spite tion, pene sed tamen avide legiĝis liaj verkoj en vasta rondo. Tiu populara verkisto « lernis legi sian popolon » kaj rajte lia monumento portas tiun multsignifan surskribon.

La verkoj de Conscience aperis en ĉiuj ĉefaj lingvoj. Ke ili ankoraŭ nun estas ŝatataj en eksterlando, tion montras la germana traduko de lia « Jacob van Artevelde », kiu antaŭ kelkaj monatoj aperis sub la titolo « Die Bürger von Gent ».

Jam frue la verkoj de tiu granda romanverkisto logis la esperantistojn al traduklaboro. En 1904 aperis « Paĝoj el la flandra literaturo » de Dr. M. Seynaeve kaj Dr. R. Van Melckebeke. En ĝi troviĝas fragmentoj el « La rekruto » (De loteling), « La fera tombo » (Het ijzeren graf) kaj el « Jacob van Artevelde ». Tiu elekto vere estis bonega kaj laŭ la diversaj facetoj konigis al la internacia esperantistaro la mondfamiĝintan flandran romanverkiston. En 1906 aperis la esperanto-traduko de « Blinde Roza » sub titolo « Blinda Rozo » de s-ino Van Melckebeke - Van Hove. En 1912 sekvis « Rikke-Tikke-Tak » kies tradukon prizorgis Maria Posenaeer. La esperanto-tradukoj de la Conscience-verkoj trovis entuziasman akcepton flanke de la tiamaj esperantistaro, kaj en 1913 jam sekvis la traduko de « Wat een moeder lijden kan ». Tradukita de Fr. Schoofs ĝi aperis sub titolo « Kion patrino povas suferi ».

En 1929 la konata esperanto-verkisto kaj lingva komitatano H. J. Bulthuis majstre tradukis « De Leeuw van Vlaanderen », ĉefverko de la granda romanisto. H. Conscience senkonteste estas la nederlanda verkisto plej multe legata en Esperanto.

Okaze de la apero de la esperanto-eldono de « La Leono de Flandrujo » (jes : « de Flandrujo », malgraŭ obstina kontraŭstaro kaj malrekomendo de ia esperantista tendaro !) estiĝis tipa incidento. La tradukinto donace sendis luksan ekzempleron de tiu esperantigita flandra eposo al la tiamaj belga reĝo Albert I kun skriba dediĉo en esperanta kaj nederlanda lingvoj. Responde li ricevis dankesprimon en lingvo... franca !

La flandra popolo parkere konas kaj ankore tenas la finajn vortojn de « La Leono de Flandrujo ». Tiuj vortoj tekstas jene : « Flandroj, kiuj legis ĉi tiun libron, pripensu je la gloriĉaj faroj kiujn ĝi enhavas, kio Flandrujo antaŭe estis, — kio ĝi estas nun, — kaj pli multe, kio ĝi estiĝos, se vi ne forgesos la sanktajn ekzemplojn de viaj praavoj ! »

EC.

## NIGRA PAĜO EN MIA KONGRESLIBRO

Jaŭdon la 4-an de Aŭgusto, 1938a.

Ĝi jam komenciĝas malfeliĉe : la ĉambristino forgesas veki min, kaj je la 9-a mi kun teruro ekvekiĝas. Nepre mi volas ĉeesti la Laborkunvenon ; mi rapidas, vundetas min kelkfoje dum razado, rapide matenmanĝas, kaj foriras el mia hotelo. Kiun mi vidas antaŭ mi ? Jes, laŭstature ŝi estas f-ino Saxl kaj ŝi certe ĝojos se ni kune iru al la kunveno. Rapidigante miajn paŝojn baldaŭ mi atingas ŝin kaj eligonte la vortojn « bonan matenon » mi rimarkas ke mi eraras.

En la akceptejo. La unua, kiun mi renkontas estas mia malnova konatulo kaj kunleganto de Heroldo, S-ro van As.

« Jen la du lastaj numeroj de Heroldo », li diras, kaj : « Ĉu vi jam aŭdis, f-ino Saxl hodiaŭ matene subite mortis ! »

« Kio ? » Jes, iru al f-ino de K. Si loĝas en la sama hotelo ; jen ŝi estas ». kaj li foriras.

F-ino de K., el Loveno, mortpale rakontas la okazintaĵon al ĉirkaŭstarantoj. Mi aŭdas la vortojn, sed ne povas realigi ilin en mia cerbo. Larmoj enpenetras miajn okulojn. Larmoj ? de kie ili venas ? Dum kiom da jaroj mi ne ploris ? Mi foriras, vagadas ĉien tra la halo, renkontas konatajn al mi gesamideanojn. « Terure, ĉu ne ? » Larmoj denove en miaj okuloj. Mi hontas, kaj deturnas min, mordas miajn lipojn, diras enpense : malfortikulo, ĉu vi ne pli bone povas kaŝi viajn sentojn, ĉu vi estas eksmaristo ? Ha, via koro estas el vakso ! Mi eksidas sole en angulo kaj mi vidas nin ambaŭ, ŝin kaj min sur la boato inter den Helder kaj la insulo Texel dum la landa kongreso de L. E. E. N., Pasko 1937a. Oni fotografas ŝin kaj ridete ŝi ŝovas sian brakon en la mian.

La sekvintan jaron en Aŭgusto ŝi alvenis en Antverpeno, vojaĝante al Duinkerkon. Kelkaj samideanoj akceptis ŝin ĉe restoracio. Mi ne volis ke ŝi manĝu sola kaj kunmanĝis kun ŝi ; poste,



kune kun la teritoria sekretario kondukis sin ŝipen.

Ĉu tiuj estas la kaŭzoj, ke mi ne povas regi min? Se jes, kiel mi kondutos, se mia edzino aŭ unu el miaj infanoj mortas?

« Forigu sin el viaj pensoj. hodiaŭ ŝi, morgaŭ vi mem! Sed tamen: kial ŝi..... kial ŝi? La plej bona, la plej sukces-akirinta Ĉe-metoda instruistino, kun sia eterna bonvolema rideto sur la lipoj kaj en la okuloj? »

Mi rifuĝas al la ripozejo kaj komencas legi la « Heroldon ». Mi vidas la vortojn, sed la signifo ne enpenetras mian kapon. Eniras du blindulinoj, gvidataj de zorgoplena fraŭlino. Estas ĉarma trio..... La vidantino sidigas la nevidantinojn..... Denove larmoj? Mi mokas min pro tio. Legas la anoncojn en « Heroldo »: Samideana helpo petata. Iu serĉas rifuĝon en transmara lando. Esperantista Interhelpo N-ro 1 — Kiu helpos? Esperantistino kun knabo serĉas rifuĝon. Esp. Interhelpo N-ro 2. — Kiu pruntos 320 dolarojn? Samideano serĉas rifuĝon, devas posedi 720 dolarojn por povi eniri sian novan patrolandon kaj havas nun la duonon de tiu sumo. Esp. Interhelpo N-ro 3. — Tajlorino, tre sperta, 33-jara, pro rasa kaŭzo serĉas rifuĝon en alia lando. Esp. Interhelpo N-ro 4. Larmoj.....


Furioze mi forjetas la gazeton, prenas la kongreslibron kaj legas: Je la 20a horo — Kongresa Balo.....

Ĉu ĉeesti balon en tia animstato? Mi kvazaŭ aŭdas la voĉon de f-ino Saxl: Ne rompu eĉ iun ajn eron de la kongresprogramo pro mi! Certe ŝi estus dirinta tion, se la subiteco de ŝia morto ne estus malebliginta ĝin. Jes..... mi ĉeestos la balon, sed mi ne dancos..... Mizera tago!

Estas la 4a posttagmeze. Ĉu, verkinte ĉi tiun artikolon mia animo trankviliĝas?.....

Londono.

A. Lodema.



LIGKUNVENO. — Dimanĉon la 18-an de septembro Fl. L. E. kunvenos je la 10-a matene en la ejo: « *Nieuwe Carnot* », Carnotstraat, 70, Antwerpen.

TAGORDO:

- 1) Raporto pri la antaŭa ligkunveno.
- 2) Raporto morala kaj financa pri nia 9-a kongreso.
- 3) Nia agado dum la venonta vintro.
- 4) Nia 10-a kaj jubilea kongreso.
- 6) Diversaj komunikoj.

Ni petas niajn sekciojn sin reprezentigi per delegito. Niaj reprezentantoj kaj ligoj estas bonvenaj. La ĉef-estraranoj kunvenos de la 9-a ĝis la 10-a en la sama ejo.

NOVAJ SEKCIOJ. — Kun plezuro ni bonvensalutas sekvantajn novajn sekciojn: *Bornem* (Akvaj Birdoj). *Denderleeuw* (La Leonidoj). *Merchtem* (La gajaj Esperantistoj). *Puurs* (Inter Ni). *St. Amands* (Skeldaj Ratoj). *Willebroek* (La Verdaj Papilioj). *Kontich* (Ĝojo kaj Laboro).

LIBRO - LOTERIO F. E. I. — Kiel pasintan jaron Flandra Esperanto-Instituto organizas okaze de la libro-tago, grandan libro-loterion. La listo de la premioj aperos en la venonta numero de Fl. Esp. Loteri-biletoj estos haveblaj dum la ligkunveno kiu okazos la 18-an en Antwerpen. La biletoj kostas po 1 franko.

## BRUGO LA BELA

Por multaj kiuj ĉeestis la kongreson estos ĉiam granda ĝojo rememori al si la belajn tagojn kiujn ili travivis en Brugge, la urbo de nia naŭa.

Ni estis irintaj Brugge'n por kongresi, por montri ke nia Esperanta movado grandiĝas, sed ankaŭ por ĝui de la beleco kiu ankoraŭ regas ĉi-tium, iam riĉan kaj potencon urbon el la mezepokoj; kaj je kiu de ni, kongresintoj, ĝi ne impresigis? Ne, ne estas imageble ke bona Flandro povus ĝin ektuŝi per la piedoj sen ke liaj sentoj ekparolus lin pri pasintaj gloro kaj potenco, sen ke lia koro tremus je la ekvido de la artaj konstruaĵoj, la altaj turoj kun jarcentoj en la krono, kiujn Brugge ankoraŭ entenas.

Jes, bela vi estas ankoraŭ, vi la plej aĝa el la tri fratin-urboj; poete vi kuŝas ankoraŭ sur la plej fruktodona peco de Flandrujo, kun viaj arte konstruitaj domoj, viaj larĝaj stratoj, multaj placoj kaj belegaj palacoj; kun viaj urbkanaloj, kiujn limtuŝas ĉarmaj ĝardenetoj kaj sur kiuj la blanka cigno sin respegulas en la sun-radioj. Ho! vi, la iama fiero de la Flandroj, nun la ŝatata de la artistoj, vi estas ankoraŭ bela! Sed vi estas tiel silenta, tiel malĝoja, tiel morta kun tiuj vastaj dokoĵ sen ŝipoj, tiuj multaj domoj kaj malmultaj loĝantoj, inter kiuj tiom da malriĉuloj kaj..... francemuloj! kun tiuj kavalir' domoj fermitaj kvazaŭ ili ĉiuj entenas mortinton! Ho! kiaj sentoj trakuras min je via alrigardo!

Kaj tia ombra ton', tia malgaja kant',  
eligas min, ĉar vidas mi la urbo rand',  
o bela Virgulin', plej bela el la urboj!  
la signon portas vi de nobelec' ĉe lumboj,  
ankoraŭ ĉirkaŭ vi, radi' de glor' pasinta,  
ŝvebas; sed morta man' pesegas nun sur vi:  
kvankam en vi, la bela Brug' retrovas mi,  
sed ve! ne plu la Brug' vivanta! (I)

Kaj kiu ne ŝatus promeni en viaj stratoj, via Groene Rei, Dyver, Rozenhoedkaai, Beginejo, k. t. p. kie estas facile sin imagi kaj revidi kiel vi estis antaŭ ses, sep jarcentoj. Estas agrable tie promeni laŭlonge de viaj kanaloj, aŭskultante la tintajn sonojn de la belega sonorilaro, kiuj dissenditaj de el via alta Belfrido-tu-



ro venas, trans dormemaj tegmentoj, en kvietaj kaj paca aero karesi niajn orelojn kvazaŭ invitante nin revii pri viaj gloraj epokoj; pri la tempo kiam vi pompe festis la foriron de niaj prapatroj al Jeruzalemo; kiam la reĝino de Navario ekkriis ke centoj da reĝinoj loĝas en Brugge je la ekvido de la riĉaĵoj, kiujn viaj virinoj portis; kiam la francaj nobeluloj venis Flandrujon por forrabi viajn trezorojn kaj trovis sian tombon; pri la tempo kiam la Bruĝaj arto kaj scienco estis mondfamaj; kiam en unu tago cent kvindek orumitaj kaj flagitaj ŝipoj envenis viajn havenojn, sub la krio de la maristoj de ĉiuj marbordoj, la tempo kiam insulta vorto de fremda reĝo sufiĉis por ekpreni la armilojn por defendi honoron kaj propraĵojn, lingvon kaj kutimojn; kiam de el la buŝo de viaj filinoj ĉarme elfluis la belan Flandran lingvon pri kiu ili fieris. Jes, tiam vi estis de ĉiu laŭdita kaj la plej bela ornamo de Flandrujo nomita, tiam vi trovis la fonton en vi mem de gloro kaj potenco, tiam vi alparolis fiere la fremdul', tiam vi estis granda, O Bruĝ'!, kaj nun!

Nur via ombro restas al kio sentema filo ne povas rigardi ne malĝojante. Sed morta vi ne estas! Ni Flandroj bone scias kaj sentas ke en vi ankoraŭ varma koro batas, ke en la brusto vi konservas neelĉerpeblan fonton da fortoj, kiu, ĉe la revekiĝo el via jarcenta dormo, — kaj ni esperas ke tio baldaŭ okazigos — vin igos granda kaj potenca kiel antaŭe. Tiam la nova generacio denove alrigardos vin fiere kaj serĉos propran feliĉon en propra virto kaj honoro, tiam retrovos vin la mondo ne nur bela, sed ankaŭ vivanta!

Aalst.

*Neirinckx Edmond.*

(1) Tradukita el « Drie Zustersteden » de Ledeganck.

### Surprizo

Kiel juna infaneto  
Gojas pro donac' de flor'  
Tiel pro apero via  
Feliĉiĝis mia kor'  
Carme kiel blua nimfo  
« Dolĉa, bela karulin'! »  
Multan ja mi devus diri  
Pri la viv' de la anim',  
Sed ĉi longan historon,  
Ĉiam mi forgesas ĝin.  
Mi forgesas pro feliĉo,  
Pro parol' el via buŝ',  
Pro ridet' el blu-okulo  
Pro l' plej eta fingrotuŝ'  
Ho, ke iam Vi komprenu  
Kiel en interna viv'  
Vi de ĉiu energio  
Estas sola la motiv'!

### Skizo

La mistero  
de l' vespero  
ĉion ĉirkaŭpremas,  
kaj naturo,  
Tra la strato pasis vi.  
Pie alproksimiĝante,  
Tremon ĝojan kaŝis mi.  
El okuloj brilis fajro  
De l'eterna am-esprim'  
Kaj silente mi nur flustris:  
pro l' murmuro  
nur de l' vento tremas.  
Pala luno,  
nokta suno,  
ĉe l' ĉielo brilas;  
en la valo,  
nubvualo  
al la mar' similas.

Tiam en la komunejo  
Vivo estos la surpriz'  
De mil ĝojoj nekonataj:  
Nia tera paradiz'!

*Pol Van der Poel.*

Montoĉeno,  
neĝkurteno,  
flave nun reflektas;  
ĉiu roko  
en la loko  
nigran ombbron plektas.  
Ventmurmuro  
en naturo  
fine ankaŭ ĉesas;  
la mistero  
de l' vespero  
ĉion ja karesas!

*Montana.*

*Juul Karnas.*

## EŬROPO HODIAŬ

similas al vulkano. Oni neniam scias, kiam ĝi erupcios. Tion sentas ankaŭ nia entrepreno, kiam ni vidas, ke niaj fidelaj abonantoj hezitas sendi sian abonon al Mez-Eŭropo, kie la situacio estas necerta kaj ŝancela. Unu post alia ni ricevas demandojn, ĉu ni ne timas la sekvon saman, kia trafis nian movadon en Aŭstrio? Ni devas diri, ke ne. La situacio en Hungarujo ne estas simila al tiu de Aŭstrio postmilita. Ni, hungaroj fidas plene en la prudento de la registaro, kiu scias bone, kiaj teruraj konsekvencoj trafus nian malfeliĉan landon, se ĝi sekvus ekzemplojn najbarajn. Neniam ni okupiĝas pri taga politiko, sed nun ni opinias necese konatigi al niaj legantoj la traktadojn inter Hungarujo kaj la najbaraj landoj de la malgranda Antanto pri pli intima kunlaboro. Tiuj traktadoj daŭras kaj iliaj sukcesoj ebligas la konservon de paca, evolukapabla atmosfero en Hungarujo. Se estas en Hungarujo, kiuj tamen ne estas tiom firmaj pri la estonto de la politiko interna, estas fakte neniu, kiu timus momentan militon Mez-Eŭropan. La motivoj de tiu ĉi maltimo estas jam pli komplikaj, ol ke ni povu tion publikigi en tiu ĉi simpla informa artikolo, sed ni plene aliĝas al tiu konvinkiĝo. Tamen, ni scias, ke en la intereso de niaj abonantoj kaj en la intereso de nia movado ni ne povas esti sufiĉe singardaj. Pro tio ni jam de post la jaro 1933 efektive estas tute aliformintaj nian entreprenon sur plene internacia bazo. Niaj kvazaŭ kunposedantoj kaj reprezentantoj en plej diversaj landoj de Eŭropo, inter ili en Nederlando, Svedujo, Svisujo, Estonio ebligas al ni transmeti nian agadcentron *en kiu ajn momento al kiu ajn taŭga lando*, se tio montriĝas necesa. Niaj presejoj nun funkcias krom en Hungarujo ankaŭ en Italujo, Jugoslavio, Latvio, Belgujo kaj ĉefe en *Hongkong*, de kie la milita danĝero ŝajnas tute forpasinta. Niaj spertaj oficistoj estas diversnacionoj kaj diversreligianoj. Ni do povas garanti, ke *iu ajn subita ŝanĝo en nia ĉefa sidloko ne influos pli la agadon de nia eldonejo*, ol kaŭzi maksimume dusemajnan malfruon provizoran.



Kiel vi vidas, ni faris ĉion home eblan por ke ni seninterrompe povu labori por la progresigo de nia literaturo sendepende de iu ajn ŝanĝo Eŭropa. Estas nun la vico al niaj fidelaj klientoj, ke ili ebligu tion al ni. Se niaj klientoj ektimiĝas kaj panike retenas sian monon en la poŝo, aĉetas nek jam aperintajn librojn, nek sendas al ni siajn abonojn kutimajn kaj nepre por nia laboro necesajn, ne la Eŭropa situacio, sed ili mem paralizos la funkcion de la (fiere ni povas diri) nun plej signifa Esperanto-eldonejo, devigas ĝin al malkonstruo de ĝia organizaĵo kaj preskaŭa nuligo de ĝia agado. Se niaj klientoj fidos plu, tio ebligos ne nur seninterrompan laboron, sed eluzon de tiaj cirkonstancoj, kiuj nun estas donataj al nia eldonejo. Ni ĵus kontraktis kun grava presejo en Hongkong, kiu presos por ni librojn en la amplekso de 6000 (SESMIL) paĝoj jare. Neniam aperis entute tiom da literaturaĵoj en Esperanto dum unu jaro. Estas la vico de la fidelaj, entuziasmaj esperantistoj, ne malaltigi siajn elspezojn por Esperanto-libroj kaj per tio ebligi evoluon, ĝis nun eĉ ne supozitan.

Ni *fidas* la bonvolon kaj prudenton de la esperantistaro. Ni enmetas en tiun fidon nian monon, nian laboron, nian vivon.

*Fidu vi* la estonton de la movado mem. Jen estas nia peto.

Se ni ambaŭ fidos, ni produktos komune laborante rezultojn eĉ en la nunaj tre ĉagrenaj kaj afliktaj tempoj.

Ni montris kaj montras la rezultojn de nia fido kaj atendas la rezultojn de via fido.

*Literatura mondo.*

## EL ĈEĤOSLOVAKUJO

Karaj Geamikoj,

Al vi ĉiuj, mi sendas hodiaŭ plej korajn salutojn kaj manpremojn el mia patrujo. La tempo pasas rapide, senhalte kaj oni eĉ ne kredus ke jam plenaj semajnoj forpasis depost kiam mi lastafoje vidis vin. Tamen ni ne plendu, sed kontraŭe ni zorgu ke la tempo estu ĉiam programriĉa. Mi ofte rememoras je nia kunlaboro, je konstruado de novaj sekcioj kaj ĉio reviviĝas antaŭ miaj okuloj. Mi ankaŭ ĝoje konstataŭs, ke vi vidas en mi daŭre vian bonan amikon ĉar jam pli ol kvindeko da leteroj ricevintaj dum lastaj kvar semajnoj ĝin klare pruvas. Mi kore dankas al ĉiu sendinto. Laŭ la anoncintaj klubaj programoj mi vidas ke vian promeson vige kaj diligente labori vi jam fakte plenumis. En Esperanto vi trovis solvon inter la bono kaj malbono. Esperanto havas vastegan kulturalan laborteronon, ĝi satigos viajn animojn kaj restos por ĉiam via bona kamarado. Bone propagandu! Apogu vian propagandlaboron per faktoj kiujn nia movado atingis. Speciale nun en tempoj malfacilaj, kiam la mondo minacas eksplodi per nova interbatalo por kialoj tute egoismaj, estas nepre necese ke ni klopodu forigi tiun danĝeron. Pere de Esperanto ni studu la kulturon de alilandanoj kaj ni klopodu ilin kompreni. Amikoj, kuraĝe

al via laboro. Via plej proksima programo estu ĉiu Esperantis<sup>o</sup> devas gajni 1—2 intersemuloj por proksima laborperiodo.

Mi refoje dankas por viaj leteroj kaj kredu ke mi ĉiam ĝojas aŭdi pri via laboro. Mi volonte respondos al ĉiu skribinto sed mi petas afablan pardonon se ĝi estos kun iom da prokrasto, ĉar ankaŭ mi antaŭ ĉio devas plenumadi mian profesion laboron. Faru bone kaj ĝis baldaŭa revido.

Kore vin salutas via

*Karlo Solc.*

## La Morto de Panjo

Panjo mortis... Silente kaj korpemate ni sidas en la loĝoĉambro. Neniu kuraĝas rompi la silenton... ĉies pensoj estas ĉe la kara mortintino. Mi vidas ŝin sur ŝia mortolito, kun palaj vangoj kaj ŝlositaj okuloj, kiuj ankoraŭ parolis kiam la buŝo jam estis muta. Ho, tiuj lastaj amaj vortoj, tiu lasta dolĉa rigardo, tiu lasta spirĝemo! Miaj pensoj flugas ĉirkaŭ ŝi, kiu min edukis zorgplene kun senlima pacienco, kiu per spiro enĉizis kaj per koro enmartelis en min la bonon kaj noblon.

Panjo mia ne plu estas!... Ŝi adiaŭis per kelkaj konsolvortoj: « Ĝis revido, miaj karuloj! » Nun, ŝi ankoraŭ estas inter ni sed baldaŭ la tero demandos sian parton kaj la ĉerko malaperos en la avidan buŝegon de la malvarma tombo.

Ĉiuloke la bildo de Panjo nin sekvas, kontraŭvole ni pensas al ŝi. Muroj, tablo, ŝranko, seĝoj kaj eĉ la afabla sentenco « Ne nom' sur tero tiel bela, ne vort' en buŝo tiel dolĉa, kiel Panjo », ŝajnas voki: « Panjo, kara Panjo! » Kaj ankaŭ la portreto sur la muro..... Ne, Panjo ne mortis!..... Rigardu, tiujn vivoplenajn kaj helajn okulojn, tiujn rozajn molajn vangojn, tiun oran rideton ĉirkaŭ la kara buŝo..... Ĉu la kruela morto nuligis ĉion ĉi-tion?..... Paĉjo sidas sole kaj ploras..... Nun mi sentas, ke ni perdis la plej grandan, jes, la plej valoran trezoron tie-ĉi sur la tero. Ĉe la tablo ŝia loko restas neokupita.....

Vespere Paĉjo rakontas al ni, kian ĉagrenon ŝi suferis pro ni, kiajn timigajn noktojn ŝi pasigis ĉe nia lulilo, kiam ni estis malsanaj. Ni ploras. Ho, kion ni ŝuldas al ŝi! Neniam ni povos rekompenci tiom da boneco!

Panjo, ripozu en paco! Ĝis la revido!

*Frans Breugelmanns.*

## Ĉi-tie la Flandrema Grupo Esperantista, Antverpeno!

Do, kio okazas?... kompreneble festo!

Sed, ne nur festo; ankaŭ ni havas seriozegan okazaĵon gravan, nome: la ligkunvenon de la Flandra Ligo Esperantista!

Estas ja sabaton, la 17-an de Septembro, ke ni organizos nian ĉiujaran feston; kaj la sekvantan tagon, do je la 18-a, okazos la ligkunveno!



Nia programo ? ! Ĝi estas surŝarĝita !!!

Por la sabatvesperfesto ni citas jam : kantadon, teatraĵon, gazbandon kaj balon.

Post la matena oficiala ligkunveno ni havos viziton al la centra telefono de Antverpeno ; kaj posttagmeze ni vidos marionet-teatraĵon.

Ĉu ne ankoraŭ sufiĉas ?

\* \* \*

Ni korege invitas ĉiujn Vin ; kaj : Bonvenon !!!

Loĝado ĉiam havebla en Antverpeno.

Informojn donos : Sekr. de la F. G. E., Draakstr. 22, Antverpeno.

Kie : la vesperfesto okazos en hotelo « De Ton », Pelikaanstr. 10, fronte al la elirejo de la Centra Domo ;

la ligkunveno en nia ejo « Nieuwe Carnot », Carnotstr. 70.

## DIVERSAĴOJ

### 18a KONGRESO DE S. A. T. EN BRUSELO.

En Bruselo okazis la 18a internacia Esperanto-Kongreso de « Sennacieca Asocio Tutmonda ». La kongreso fariĝis granda sukceso. Pli ol 650 esperantistoj el 16 landoj partoprenis ; ĉirkaŭe la duono el la partoprenantoj estis SAT-anoj. Oni tre bone estis organizinta la loĝadon de la plejparte malriĉaj kongresanoj : en amasloĝejo (lernejo) loĝis 300 personoj, en tendejo (35 — 40 tendoj) loĝis 100 personoj.

Regis vera harmonia, amikeca atmosfero dum la tuta kongres-semajno kaj translimaj amikiĝoj multnombriis.

Venontjare la kongreso okazos en la metropolo de Danlando, Kopenhago. Ĉiuj esperantistoj — ankaŭ ne-SATanoj — estas kore invititaj partopreni ĝin (la partopreno estos treege malmultekosta !)

Koran bonvenon al Kopenhage (5 — 10 de aŭgusto 1938 !)

### JARKUNVENO DE No. So. B. E.

La duan de julio okazis la naŭa jarkunveno de Nederlanda societo de blindaj esperantistoj en Hago. Ĉeestis ĝin gemembroj el ĉiu parto de nia lando.

En sia malfermparolado la prezidanto, s'ro R. Israëls, de Ex-loërmond, speciale bonvenigas niajn vidantajn samideanojn s'ron Jung el Germanujo kaj s'ron Dupuis el Francujo. Pro ilia ĉeesto la kunveno havis iometan internacian karakteron.

El la jarraporto montriĝis, ke No. So. B. E. estas kreskanta organizaĵo. Ĝia membraro nun nombras proks-cent gemembrojn.

La propaganda komitato aranĝis en 1937 du artvesperojn, tute prizorgitajn de blinduloj. Ili estis granda sukceso.

Kreskadis la nombro de brajlolibroj en nialandaj blindulbibliotekoj.

Decidiĝis, ke nia brajla bulteno (La kontakto aperos ok

fojojn en jaro.

La sekvantan jaron No. So. B. E. festos sian dekjaran jubileon, tiam la jarkunveno okazos en Amsterdam, ĉar tie fondiĝis nia organizaĵo.

S-ro Jung faris prelegon pri lasttempa esperanta literaturo, atente priaŭskultis la ĉeestantojn kaj dankis la preleginton per varma aplaŭdado.


Post la komuna panmanĝo okazis la festvespero, kiun ĉiĉfoje prizorgis viduloj. Je laŭdinda maniero. Apartan mencion meritas la voĉlegado de samideano Dupuis, el de li mem tradukita verko de Duhamel.

Je la deka finiĝis la kunveno pri kiu ni povas esti kontentaj.

Sekretario de No. So. B. E., Herlaerstraat 24 A., Rotterdam.

## Por Nia Liga Flago

Sumo de la antaŭaj listoj	1387,20 fr.
Sekcio Brussel (N. E. L. E.)	13,10 fr.



BRUGGE. — *Paco kaj Justeco.* — Ĉiusemajne ni kunvenas. Je nia tre granda kontenteco, la tri novulinoj kiuj ne ĉeestis la ekskurson tamen tre bone progresas. Dum ĉiu kunveno ni havas ekzercaĵojn en la Esperanta lingvo kaj superan kurson. Tiu supera kurso konsistas el ripetado sed ankaŭ pli profunda klarigado de gramatikaj reguloj kun oftaj komparoj el samaj reguloj en aliaj lingvoj. Tio ebligas montri la logikon de nia lingvo.

La 3an. de julio ni grupe biciklis al la nacia kantfestoj en Gent. Tie ni bone povis uzi la servojn de la Gentaj gesamideanoj.

La 7an. ni havis debatvesperon pro « arto ». Tri genederlandanoj partoprenis.

Unika tago por nia sekcio estis dimanĉo la 17an de julio. Aŭtobuse ni iris al Kortrijk por piedpilkludi kontraŭ la tiea sekcio. Denove ni gajnis (2—1) ne nur la punktojn sed eĉ tre belan pokalon je rememorigo donacitan de Dr. Sabbe el Waregem. Je la komenco de tiu memorinda piedpilkludado ni ricevis florbukedon. Post la konkurso ni festis en la ejo « Pioen » kie la ludantoj ricevis manĝaĵon. Poste ni metis la florojn antaŭ la monumento de « Groeninge » kaj reiris al la ejo de la Esperantistoj kie ni daŭre festis. Fine ni devis foriri je la 9a kaj ankoraŭ iomete haltis en Ingelmunster. Ankoraŭfoje ĉi tie ni devas publike danki sekciojn Kortrijk kaj Waregem kiuj donis al ni ĉiuj laŭdegindan ekzemplon. Kiuj aliaj sekcioj volas organizi kun ni piedpilkkonkursojn ?

Dum la du sekvintaj jaŭdoj okazis interesaj deklaroj kaj de-



bato pri la « spirito de nia grupo » kaj « nia grupo kaj la politiko ». Al la dua partoprenis samideano el Meulebeke.

La 31an. de julio ni biciklis al Veurne por vidila faman procesion de la pentofaro. Matene ni iris al la marbordo kie ni ludis.

BRUSSEL. — *Nia Estas la Estonto*. Libertempo ne signifas ripozon por la bruselanoj. Tion pruvis nia multnombra ĉeestado je la ekskurso al la arbara ĉirkaŭaĵo de Tervuren, organizita de la tiea tutnova Esp. grupo. Dum tiu ĉi ekskurso al kiu trideko da esp. partoprenis ni interkonatiĝis kun la verdaj novuloj el Bertem kaj el Tervuren.

Sekve de tiu interkonatiĝo la Brusela grupo denove vojaĝis al Tervuren la 3an de aŭgusto por tie teni modelan grupkunvenon je la intenco de la malsperta sed kuraĝa grupo. Sur la programo estis: perfektiga leciono kaj ĝeneralaj informoj koncerne grupvicon, donita de la prezidanto de N. E. L. E.; esp. parolado pri Hendrik Conscience de s-ano A. Ackaert el Bruselo; informoj pri esperanta grupbiblioteko donitaj de nia bibliotekisto s-ano R. Hessens, kaj por fini lernigas ludoj. Post la 14 tagaj kunvenoj de la 11a kaj 28a de aŭgusto, la regulaj semajnaj kunvenoj rekomencos. Dum la kunvenoj en julio nia grupkasisto kolektis 13,10 Fr. Per tiu sumo nia grupo alportas sian trian subvencion por la Liga flago.

LEUVEN. — « *La nova tagiĝo* ». — Montriĝas tradicie, ke ĉe komenco de nova administra jaro okazas malfacilaĵoj en nia grupo. Tiumtempe, kelkaj grupanoj opiniis ke estis absolute necese malpliigi la nombron de 6 estaranoj je nur 3; kaj ĉar la plimulto decidis kontraŭ tiu ŝanĝo, ili triope supozis esti devigataj ekŝiĝi. La nuna estraro konsistas el:

Prezidantino: Sanino Dekesel

Kasisto: Sano H. Cuypers

Bibliotekisto: Sano K. Istas

Sekretario: Sano Fr. Frantzen — 106 Tiensestraat, Leuven.

La postenoj de Vice-prezidanto kaj propagandestro restas vakantaj, tial ke ne prezentis sin kandidatoj.


MEULEBEKE. — *Nova Vivo*. — Nia sekcio fondiĝis la 1an de julio kaj nombras 13 membrojn. Dum niaj kunvenoj, kiuj okazas en la komunuma lernejo, ni ĉefe konversacias en Esp. Sub gvido de nia animo S. instruistino, ni fervore daŭrigas la studadon. Ĉiu leciono finiĝas per amuza parto. La organizo de biciklaj ekskursoj estas en preparo.

TURNHOUT. — *Turnhouta Espero*. — La 20an. de julio dekduo da gesamideanoj de Oud-Turnhout venis pasigi gajan vesperon kun ni. Oni kantis, rakontis, prelegis, kaj amuziĝis per amuzigaj ludoj. Tamen la ĝojo ne estis kompleta, ĉar oni anoncis la foriron de Sro. Van Doren kaŭze de translokiĝo al Antverpeno. Tiu foriro estos granda perdo por ni. En Sro. Van Doren ni perdas nian estimatan profesoron, konsilanton kaj gvidanton. Unuvorte li

estis la animo de nia grupo. Tre bedaŭrinde estas tio por ni. Li tamen ne forgesos nin, kaj promesis viziti nin kiel eble plej ofte. Ni disigis kiam estis jam malfrue kaj la Oud-Turnhoutanoj reinvitis nin.

La unuan de Aŭgusto ni faris la kontraŭviziton al la Oud-Turnhouta grupo. Dek kvin gemembroj de nia grupo ĉeestis. Ni ĝoje konstatis ke la Oud-Turnhouta grupo estas plenviva; kaj la aranĝo de tiu amuziga vespero honoras ilin. Estis vera sukceso. Precipe la gajaj ludoj kaj la dancado plaĉis al ĉiuj. Regis vera amikeco. Ĉiuj estis kontentaj, malgraŭ la soifiganta varmego, kio pruvis ke la neĉeestantoj malpravus. La tempo pasis tre rapide ĉe tro rapide ĉar estis tre malfrue kiam oni hejmeniris.

V. M.



(Duope ricevatajn verkojn ni recenzas, unuope ricevatajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol redakcio, administracio aŭ Flandra Esperanto-Instituto, estos ignorataj).

ESPERANTO-KORO. — Korformaj verdaj cirkuleroj kun kortuŝa teksto favore al homeca, senkalumnia konduto, paco kaj Esperanto. Sur ĉiu « Koro » la teksto estas je unu flanko en E., je la dorsflanko en Angla, Germana, Franca, Itala, aŭ Ĉeĥa lingvo. Aldonante tiujn korojn al korespondadoj destinitaj al ne-Esperantistoj kaj ĉe al Esperantistoj, oni faras laŭdindan kaj originale trafan propagadon. Dek korojn sendas por unu internacia respondokupono: « Esperanto-Koro » *Dubrovnik*, Jugoslavujo.

VIZITU LOVENON. — Turisma propagandilo unupaĝa kiu bilde montras la urbodomon kaj dorsflanke donas utilajn informojn al turistoj kiuj deziras viziti lokajn vidindaĵojn. La informoj bedaŭrinde estas redaktitaj en tre kripla lingvo kaj preseraroj ankaŭ makulas kelkloke. La tradukinto, aŭ kompilinto, krome esperantigis la nomojn de kelkaj stratoj, sekve Savooiestraat iĝis Sovojostrato (?!), k. t. p. Tiu troa esperantigemo ne faciligos vojerĉadon al alialandaj samideanoj, kontraŭe! De tiuj propagandiloj « kvanto » estas ricevebla, kontraŭ sendo de 1 fr. en p. m., de Wauters M., Diesta (?!) strato 184, LEUVEN.

LA AVENTUROJ DE L. R. M. STULTULOF LA X-a. De F. V. Dorno. Ĝenerala deponejo: O. E. L. Battelsche steeneg, 303, Mechelen. Prezo: 5 fr.

Estas burleska satiro de iu reĝo nomita Stultulof la X-a el Fuŝio. Ni nur povas bedaŭri ke la aŭtoro ne konsultis kompetentan lingviston antaŭ ol doni la manuskripton al la presisto. En estas granda kvanto da eraroj stilaj kaj gramatikaj, ilin ĉiuj pri-trakti tie ĉi ne eblas. Ni nur citu karakterizan frazon troviĝanta sur paĝo 19: « Li devus estiĝinta burleskulo »... Krome svarmas



je preseraroj. Cetere al la aŭtoro ne mankas rakontistan talenton kaj ni esperu, ke post funda pristudo de la lingvo, li havigu al ni ĝueblajn legaĵojn.

LA EKONOMIAJ KAŬZOJ DE MILITO KAJ DE INDUSTRIA MALBONSTATO. — El la Angla tradukis M. Wihl. Broŝuro 8-paĝa eldonita de « Unuiĝo por Tervaloro - Impostado kaj Libera Komercio ». Prezo 2 pencoj. Adreso : 34, Knichtrider Street, London E. C. 4.

EVANGELIO KAJ SOCIO. — Intergacia Gazeto por radikala vivanta Kristanismo, en la servo de la Regno de Dio. Laŭ propra enkonduko : « Nova Esperanto-gazeto, ne dependa de ia eklezia aŭ socia grupiĝo, naskita el la arda deziro inernacie per Esperanto atesti pri radikala vivanta Kristanismo tute alispeca ol de nia Okcidenta Kristana Eklezio, ĉu Rom-Katolika, ĉu Protestanta, ĉu Orient-Eŭropa. Kontraŭ burĝiĝinta mondumiĝinta Eklezio, kiu genufleksas por la nuntempaj mondpotencoj, ni volas pledi por la vera Eklezio de Kristo, kiu konscias, ke ĝi eterne vivas sub la Kruco kaj kontrastas kun la tuta mondo ». Bone redaktita okpaĝa gazeto. Redaktejo kaj Administrejo : Dageurrestr. 158, 's Gravenhage (Nederlando).

Dr. K. Kalocsay - G. Waringhien : PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO, kun detala komentario pri Vorto kaj Frazo. — II-a Tralaborita eldono.

Formato 20 X 13.5 cm. 490 paĝoj, prezo 2.60 USA dol. broŝ. 2.95 USA dol. por bind. Aldonu 10 % sendkostojn. Aĉetebla ĉe ĉiu esperantista libristo.

Eldonis Literatura Mondo, BUDAPEST, IX. Soroksári-str. 38. Hungarujo.

Dr. Vallienne : ĈU LI ? unua volumo. La unua originala romano en Esperanto. Stile revizita de Dr. K. Kalocsay. Formato 19 X 13.5 cm. 204 paĝoj, prezo 0.80 USA dol. broŝ. 1.06 USA dol. bind. Aldonu 10 % senkostojn.

Aĉetebla ĉe ĉiu esperantista libristo.

Eldonis Literatura Mondo, Budapest, IX. Soroksári-str. 38. — Hungarujo.

---

GESAMIDEANOJ ! — Dum la pasinta kongreso vi povis admiri la belan glumarkon por nia DEKA ! nia JUBILEA ! !

Se vi jam posedas, uzu ĝin !

Antwerpen. Po 5 fr. por 50 ekz. ; po 9 fr. por 100 ekz..

Se ne, tuĵ mendu ĝin ĉe Flandrema Grupo Esperantista,

---



#### SOLVO DE PROBLEMO 54.

Li loĝas en numero. 6930.

#### SOLVO DE PROBLEMO 55.

*Horizontale.* — Kafo, vila, oho, dir, Marok, flirt, upup, arao, mezo, list, romanist, oveg, leĝa, akonitaj, plag, obus, luli, rolo, preni, limit, rok, era, osto, grot.

*Vertikale.* — Komb, apro, aha, ros, forum, plekt, oper, alun, kuzo, kali, pomologi, aven, neĝi, aligator, fris, obol, last, juli, idiot, somer, lir, iro, arto, stat.

#### PREMIOJ.

*Sro Couwenberg* gajnis la premion de 5 Fr. por problemo 54.

*Sro Pollet* gajnis la premion de 10 Fr. por problemo 55.

#### JARBATALO.

*Stato post Junio.*

1) Van Gindertaelen : 410 p. 2) Couwenberg : 408 p. 3, 4 kaj 5) Pollet, Keveriĵ kaj Van der Mast : 400 p. 6) kaj 7) Iserentant kaj Janssen : 399 p.

#### NOVAJ PROBLEMOJ.

Por problemo 58 ni forlotos premion de 5 Fr. Por problemo 59 unu de 10 Fr. Ensendu la solvojn sur aparta folio, metu sur ambaŭ nomon kaj adreson kaj ne forgesu glui la konkurskuponojn. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu sendataj antaŭ la 5a de Oktobro, rekte al *Sro F. Volders, Bredastr. 94, Antwerpen.*

ATENTO ! Ĉe problemo Nro 56 troviĝis malbona figuro. Ĝi devis havi la formon de diablo kaj do komenci per vorto de 7 literoj.

#### PROBLEMO 58 (10 poentoj).

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 31 literoj.

15, 5, 11 = Korpparto. (R)

28, 16, 19 = Korpparto. (R)

22, 4, 7, 21 = Katbleko. (R)

9, 23, 2, 18 = Esprimo de la vizaĝo (R)

25, 2, 31, 10, 24, 6 = adverbo (de tempo). (R)


3, 13, 12, 20, 29 = Ekzistado. (R)

1, 14, 19, 8, 30 = Eŭropano.


26, 27, 9, 17, 28 = Bonfarema. (R)

1 ĝis 31 = Proverbo.





Pere de la ĉevalsalto el la ŝakludo serĉu la proverbon!  
 JEN, VI HAVAS LA OKAZON PRUVI KE ANKAŬ VI PO-  
 VAS KUNMETI KRUCVORTON! INTERPLENIGU LA ĈI-KU-  
 NAN FIGURON! MI DONACOS LIBRON KIEL PREMION AL  
 LA 5 PLEJ BONAĴ, KIUJ POSTE ESTOS PUBLIKIGATAJ kun  
 la nomo de la gajnanto! DO ĈIU AL LA LABORO! GAJNU  
 PREMION! VI POVAS ENSENDI ĜIS FINO DE NOVEMBRO!



# Universala Esperanto - Asocio

## Celas:

*Disvastigi* la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto.

Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo.

*Krei* internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj estas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio.

*Kreskigi* inter siaj membroj fertilan ligilon de solidareco kaj disvolvigigi ĉe ili la komprenon por fremdaj popoloj.

La Asocio estas neŭtrala rilate al religio, nacieco aŭ politiko.

## donas:

*Al la Membroj:* Membrekarton kaj 250-300 paĝan jarlibron kun la adresoj de la Delegitoj, esperantistaj grupoj, gazetoj, organizoj, kun sciigoj pri nia movado, internaciaj rilatoj ktp.

*Al la Membro-Abonantoj:* Krom tio la gazeton « Esperanto », internacia ĉeforgano de la esperantistoj, kun artikoloj literaturaj, sciencaj, teknikaj kaj precizaj informoj pri la movado, *dufoje monate*.

*Al la Subtenantoj:* Krom ĉiuj dokumentoj, kiujn ricevos Membro-Abonanto, premion konsistantan el libroj el la Esperanto-literaturo.

AL ĈIU NOVA ANO dum tuta jaro, libropremion laŭ propra elekto.

KAJ ĈIO KONTRAŬ MODESTA KOTIZO! de 16 Fr. por Membro, de 40 Fr. por Membro-Abonanto kaj de 175 Fr. por Membro-Subtenanto (Belga valoro).

Pagebla al Universala Esperanto-Asocio, Genève.  
 Poŝtĉek-konto belga: 1842.00, Brussel.

# Universala Esperanto - Asocio

Palais Wilson

GENÈVE

SVISLANDO

KUPONO  
 POR LA 58<sup>a</sup>  
 KONKURSO

KUPONO  
 POR LA 59<sup>a</sup>  
 KONKURSO



OSTENDO

## HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

## DRUKKERIJ

Aŭtomata Presejo

## H. BRAEKEVELT

Statiedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversaj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.

## “BREUGEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj.

Ejo de N. E. L. E.

(Sekcio Brussel de Fl. L. E.)

## Presejo

## “HOOGER OP”

Vrijheid 101.

## Arendonk

Zorgeme elfinita presado.

Favorprezoj por Esperantistoj.

## Café Nieuwe Carnot

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj

manĝaĵoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo Esperantista  
(Sekcio Antwerpen de Fl. L. E.)



AANGENAAM LEERBOEK

VOLGENS RECHTSTREEKSCHMETHODE

Overvloedig geïllustreerd

Uiterst geschikt voor zelfstudie.

Bestellen bij F.E.I. Kortrijk

12 fr. portvrij.

Korting aan onze afdeelingen.